ESPERANTO ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizajoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popoiscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gill Norta, komercisto, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, Bucureşti
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

N-o 213
12. 10. 1924

Redakcio:
Ĉefredaktoro: *Teo Jung.*
Redaktoro: *Robert Kreuz.*
Redakciaj kunlaborantoj: *H. Jung* kaj *M. Bufin*, L. K.

Administracio:
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto suferis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj landoj 0,05 dol. aŭ 0.25 sv. fk.

Anoncprezo
po kvadrat-centimetro egalvaloro de 0.20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0.15 sv. fk.), en „Internacia Komerco“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, Bucureşti, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La Deksepa definitive en Genève.

La Internacio de P. T. T. akceptas Esperanton.

Imperia Kolegio de Tropika Agrikulturo en Trinidad-insulo.

La belega Trinidad-insulo, riĉa je multe da vegetaĵoj utilaj, estas elektita kiel loko, kie oni konstruos la Imperian Kolegion de Tropika Agrikulturo por la tuta brita imperio; do ne sole por Brita Okcidenta Hindujo utiliĝos ĉi tiu tre grava instituto, sed ankaŭ por ĉiuj aliaj britaj posedaĵoj, eĉ por Anglujo mem.

La 14 januaro 1924 Lia Rega Moŝto, sinjoro Samuel Wilson, K. C. M. G., K. B. E., C., B., Regnanto de Trinidad- kaj Tobago-insuloj, en la ĉeesto de multaj eminentuloj el diversaj rangoj kaj multaj interesuloj, metis la fondŝtonon por la estonta konstruaĵo.

En 1922 oni jam komencis doni lecionojn kun stabo de ĉirkaŭ ok profesoroj kaj dekunu studentoj en provizora konstruaĵo el ligno. La sukceso estis tiom granda, ke ĉi tiu konstruaĵo estis baldaŭ tro malgranda. Pro tio oni esperas post nun okupi la novan konstantan kolegion, kiu estos moderna hejmo de scienco, tiel bona kiel ia simila konstruaĵo en la mondo.

Nuntempe ili studadas zoologion kaj entomologion, mikologion kaj bakteriologion, ĥemion, botanikon, agronomion, ekonomion kaj baldaŭ oni aldonos teknikologion de sukerkulturo.

La celo de la kolegio estas duobla.

La unua celo estas fari ĝeneralan instruadon de tropika agrikulturo, doni oportunecojn por kompleta ekzerco en la scienco kaj praktiko de la temo al studentoj intencantaj estiĝi tropikaj plantistoj, esploruloj aŭ spertuloj en diversaj branĉoj de la agrikultura scienco. Samtempe la instituto celas faciligi al gradiĝintoj de aliaj universitatoj kaj kolegioj akiri sciadon de ĉi tiuj temoj en tropikaj ĉirkaŭaĵoj.

Ĝi estas esence instruiga kiel ankaŭ esplorinstituto kaj en ambaŭ sferoj ĝi progresadas bone.

La dua celo estas: esplorado.

Viroj de scienco estas malrapide sed certe gajnantaj iun kontrolon pri la konsumantaj fortoj de la naturo. Ilia laboro estas peniga, neniam finita; iliaj malsukcesoj estus tro bedaŭrindaj, se ne ankaŭ malsukcesoj instruus ion al ili. Ilia materia rekompenco estas preskaŭ ĉiam neatentinda, tamen fido subtenas ilin, kaj senhezite ili progresetas antaŭen. Sed por ekzerci sin por la kontraŭstareco, ili bezonas kulturon. Ili devas studi, kiajn progresojn iliaj antaŭuloj faris, kaj kiajn progresojn faras iliaj samtempuloj, alie ili eltrovus, kio jam estas eltrovita kaj ilia laboro estus vana. Antaŭ ĉio ili lernu observi akurate kaj redoni fidele tion, kion ili observis. La observanto devas fari multajn eksperimentojn kaj ĉiam elpensi novajn. Li devas majstrigi la malfacilan teknikon, kvazaŭ li devus trastudi la vivhistorion de la diversaj malamikoj de la plantoj.

Ĉi tiun studadon oni ne povas efektivigi nur hejme kaj pro tio bezonas tian instituton kiel la Imperian Kolegion de Tropika Agrikulturo en Trinidad-insulo kun ĝia riĉenhava biblioteko kaj praktikaj laborejoj kaj precipe kun ĝia stabo de spertegaj profesoroj.

D. W. Broens, St. Vincent-insulo, Brita Okcidenta Hindujo.



Haveno de Trinidad-insulo (Brit. Okc. Hindujo)
(al nia artikolo pri Imp. Kolegio de Tropiko).

Socia Vivo.

Aŭtomataj kuplaĵoj kaj sendanĝereco por fervojlaboristoj.

Laŭ rezolucio de la Kvina Kunsido de la Internacia Labora Konferenco, kunsido okazinta en Genève en 1923, la Internacia Labora Oficejo faris preparan studon pri aŭtomataj kuplaĵoj ĉe fervojoj, precipe laŭ la vidpunkto de la sendanĝereco de fervojlaboristoj.

La ĉefaj celoj de la studo estis: konstati ĉu okazis malpliiĝo de akcidentoj kaŭzitaj de kuplado kaj malkuplado en landoj kie aŭtomataj kuplaĵoj estas enkondukitaj, kaj difini la amplekson de la risko de akcidentoj en la landoj, kiuj ne ankoraŭ akceptis la sistemon.

La rezultoj de la studo estas ĵus eldonitaj en statistika raporto bazita sur sciigoj rilataj al dekkvin landoj kaj ĝenerale al periodo de dek jaroj.

La raporto komenciĝas per antaŭparolo, rezumanta la devenojn de la plibonigo, la diskutojn kiujn ĝi rezultigis, kaj la ĝeneralajn informojn kolektitajn pri la problemo, laŭ la vidpunkto de sendanĝereco.

Sekvas unua ĉapitro pritraktanta la metodojn por starigi statistikojn, la kriteriojn por komparado, la procentojn de akcidentoj rezultaj el kuplado kaj malkuplado, ktp. En la sekvantaj ĉapitroj, oni ekzamenas la statistikojn rilatajn al landoj, kie la veturilaro estas provizita per aŭtomataj kuplaĵoj kiel Usono kaj Kanado, kaj ankaŭ la ciferojn rilatajn al landoj, kie tiu sistemo ne ekzistas, tio estas, la eŭropaj landoj kaj Hindujo.

La lasta parto de la raporto montras la diferencojn laŭ la vidpunkto de profesia risko, inter la fervojlaboristoj okupataj pri kuplado kaj la ceteraj fervojlaboristoj kaj la laboristoj okupataj en aliaj industrioj.

La konkludo de la raporto estas, ke la aŭtomataj kuplaĵoj, kie ili estas enkondukitaj, estas tre profitaj al la fervojolaboristoj. La grava modifo, kiu fariĝis de la usonaj fervojoj, rezultigis plibonigon taksebian je 70 aŭ 80 procentoj pri mortigaj, kaj 80 aŭ 90 procentoj pri nemortigaj akcidentoj kaŭzitaj de kuplado kaj malkuplado.

Informservo de la Internacia Labora Oficejo.

Scienco.

Astronomio.

La plej malproksima objekto, kiu iam estas vidita de homa okulo, estas malkovrita de la Harvard-observejo. Fotografaĵoj montras palan, lummalfortan makulon sur la firmamento, kiu reale reprezentas universon (kosmon), kiel la nia. La lumo bezonas milionon da lumjaroj, por veni de tie al la tero. La plej malproksimaj steloj kaj nebulaĵoj, kiuj ĝis nun estas observitaj, havas nur distancon de 250 000 lumjaroj. La nova universo estas malproksima je 6 000 000 000 000 000 000 000 000 000 000 = ses kvintilionoj da mejloj.

Ĝi unue estis observata antaŭ kelke da jaroj de mortinta D-o Barnerd, sed nur nun oni povis fari fotografaĵojn per la centcola teleskopo de la Mount-Wilson, kiu estas la plej granda de la mondo; kaj nur per la fotografaĵoj oni povis konstati, ke ĉe ĉi tiu stelonubo temas pri universo. Ĝi respondas, kiel ni legas en la „Umschaŭ“, al la nuboj de Magelhães, malfortaj lummakuloj sur la suda ĉielo, kiuj unue estas viditaj de Magelhães kaj nur nun estas rekonitaj kiel granda stelosistemo, diversa de la galaksio (lakta vojo) kaj de nia propra stelosistemo, sed apenaŭ pli malgranda. La diametro de nia universo ĝis nun estis taksata je 350 000 lumjaroj. La plej malproksima eletendaĵo de l' senfineco, kiun komprenis la homa spirito post ĉi tiu nova malkovraĵo, estas trioble pli malproksima.

Trad. *Heinrich Fahnl*, Wien XIII/2

Geografio.

La insuloj Alberto de Belgujo.

La „Internationale Aardrykskundige Vereniging“ (Internacia Geografia Asocio) de Belgujo antaŭ nelonge havis ĝeneralan kunvenon, kie la prezidanto de la asocio, komandanto Gemery de Gerlache insistis, ke grava insulogrupo, trovita antaŭ 25 jaroj per ekspedicio al la polusoregiono, de nun estu nomata: „La insuloj Alberto de Belgujo“.

Lia propono, ege subtenita de generalo Bourgeois, estis ĝenerale akceptata.

La insuloj „Alberto de Belgujo“, de kiuj la plej gravaj, de post la reveno de la ekspedicio, estas nomitaj: Liége, Brabant, Gent kaj Antwerpen, etendiĝas je longeco de ĉirkaŭ 140 kilometroj de la Nord-Oriento ĝis la Sud-Okcidento, al 63 kaj 65 gradoj de suda latitudo kaj de 61 kaj 65 gradoj okcidenta longitudo laŭ Greenwich.

R. Van Eynde, Berchem (Antwerpen).

Geologio.

Vulkana erupcio sur Azova maro.

La 15 julio 1924 de fundo de Azova maro apud markolo „Kerĉenskij“ subite estis aŭdebla longe daŭra subtera obtuza bruo, post kiu proksime de bordo kontraŭ stacio „Golubickaja“ estis observata erupcio, kiu daŭris 10 minutojn. Sur loko de la erupcio f a r i ĝ i s i n s u l o.

A. Avdeev, Kazanj.

Medicino.

Kuracistkongreso kontraŭ la tuberkulozo.

La 10 septembro en Budapest la „Tuberkuloza Societo de Hungaraj Kuracistoj“ havis sian kongreson, kiam oni pridiskutis la diversajn kuracmetodojn de unu el la plej grandaj malamikoj de la homaro — la tuberkulozo Ĉi tiuj kongresoj estas tre indaj por la atento de ĉiu, ĉar — bedaŭrinde — Hungarujo estas laŭ statistikaj dokumentoj tiu lando, kie pleje furiozas ĉi tiu popolmalsano, kaj la kuracistoj havas konvenan teritorion por la eksperimentado.

Unue oni konstatis, ke la tuberkulozo jam ne estas same danĝera malsano, kiu ĝi estis dum la pasinta jarcento, ĝi estas efike kuracebla per la eĉ elementaj metodoj de la higieno.

Poste D-o Deziderio Okolicsányi Kathy sciigis sian metodon, kiun li eksperimentadis jam de 1917. **Li konstatis, ke en la nuksarbo estas kaŝita la kuracilo por la tuberkulozaj baciloj.** El la nuksfolioj kaj el la verdaj nuksoj li produktis flavbrunan sterilaĵon, kiun oni disponas por la kuracistoj en unugramaj ampuloj. La kuracilon

oni enigas en la homan organismon per injekcio, Ĝi (male kiel la jodino) ne igas doloron kaj post la injekcio ĝi ne kaŭzas inflamajn simptomojn. La malsanulo rericevas sian apetiton kaj la kuracilo plibonigas lian dormon. D-o Okulicsányi sciigis, ke en Jena oni resanigis per lia kuracilo tre malsanan tuberkulozulon. Tamen li konfesis, ke por la vera rezulto oni devas ankoraŭ multe klopodi.

Poste oni parolis pri la kirurgia manipulado de la tuberkulozo. *Johano Tomán*, Budapest.

Literaturo.

„Rozo en herbejo" (Goethe).

Je la 14 septembro en la Wüstenhof (bieno kaj ekskursejo) apud Vallendar a. Rejno okazis simpla, sed bela festo. Kiam en 1774, do antaŭ 150 jaroj, Goethe vizitis la familion D' Ester en Vallendar, li restadis ankaŭ mallonge sur tiu ĉi belege lokita altaĵo, de kiu oni superrigardas la Rejnvalon inter Neuwied kaj Koblenz. Ĉi tie laŭdire li verkis „Rozo en herbejo" (Heidenröslein), tre ŝatatan versaĵon, de kiu ekzistas ankaŭ diversaj Esperanto-tradukoj. La urbo Vallendar tial konstruigis simplan memorŝtonon, kiu je la 14. 9. kun partopreno de multaj societoj estis malkovrata dum muzikaj kaj kantaj prezentadoj. *Leono Funken*, Koblenz.

Pedagogio.

La papili-forma mondkarto.

Antaŭ malmultaj tagoj, ĉe vespermanĝo en franca restoracio en San Francisko, Kalifornio, mi renkontis viron, kiu multe interesis min. Malgraŭ ke li naskiĝis en la jaro 1854, li eĉ nun, por pli bone ĝui literaturon, komencas studadon de latina kaj daŭrigas studadon de franca lingvo. Ni aranĝis alian vespermanĝon, ĉe kiu li konatigis min kun s-o B. J. S. Cahill, arĥitekto de Oakland, kiu estas eltrovinto de la mondkarto tie ĉi konata sub la nomo de „Butterfly Map" (Papilia Karto).

S-o Cahill montris al ni malgrandan kaŭĉukan pilkon similan al tiu uzata de infanoj por ludado. Ĝi enhavis sur sia surfaco desegnitan karton de la kontinentoj. Li prenis tranĉilon kaj faris tranĉon en la malgranda terglobo de norda poluso, tra la uralaj montoj, ĝis suda poluso, poste aliajn tranĉojn kiel montritajn en la akompananta karto, fine malfermante la pilkon li platigis ĝin sur la tablon, montrante karton kvazaŭ ebenan. Malgraŭ ke mi jam estas vidinta lian mondkarton, tiu elmontraĵo de s-o Cahill de lia ideo faris al mi grandan impreson. La problemo elmontri la tutan suprajon de la terglobo sur plataĵo (sen fuŝordigo kaj montrante la verajn relativajn distancojn kaj situaciojn de diversaj punktoj), estas ne solvita.

Komparante tiun ĉi novan karton, science nomatan Oktaedra Projekcio, kun tiu de Mercator, oni vidas tuj la pliegan korektecon de la nova. Fakte la projekcio de Mercator, kiel oni bone konas, devas esti uzata nur por navigacio, kiel klare montrita en la originala latina titolo: „ad usum navigantium". Mercator, farante ĉiujn meridianojn paralelaj, ebligis ŝipveturiston meti linilon sur la karton kaj scii kompasan direkton de haveno de foriro ĝis haveno alcelata, ĉar en tiu karto ĉiuj kompasaj direktoj transiras meridianojn je sama angulo.

Sed tiu karto, tre utila eĉ nun por la navigacio, trograndigas la tersuprajon ĉe la polusoj, farante de la geografiaj polusoj, kiuj estas punktoj sen longeco aŭ larĝeco, vastajn areojn kiuj havas la longecon de la ekvatoro. En la karto de Mercator Grenlando ŝajnas trioble pli granda ol Aŭstralio, kvankam efektive ĝi estas nur triono.



La papili-forma mondkarto.
(Vidu specialan artikolon sub Pedagogio.)

Norda Ameriko ne estas pli granda ol Afriko kaj duobla de Suda Ameriko, kiel montrata sur la karto de Mercator, sed estas kelkajn milionojn da kvadrataj mejloj pli malgranda ol Afriko kaj eĉ iomete pli malgranda ol Suda Ameriko.

La Papilia Karto korektas ĉiujn tiujn kaj similajn erarojn, montrante ĉiujn land- kaj akvoareojn en ĝiaj veraj proporcioj.

Se oni volas scii la plej mallongan vojon inter punktoj kiel ekzemple Panama kaj Jokohama, rekta linio kunmetante tiujn havenojn en la karto de Mercator montros vojon ĉirkaŭ mil mejlojn pli longan ol la vera mallonga vojo kiu estas tiu de grandcirklo.

Sed tiu mallonga vojo estas facile trovebla en la Papilia Karto per desegno de linio rekta de Panama al Jokohama.

La principo, sur kiu la Papilia Karto estas desegnita, baziĝas sur evidenta fakto, ke oni ne povas vidi tutan globon de unu vidpunkto samtempe. Ĉiuj projekcioj, kiuj provas tion, disvolvigas trograndigajon kaj fuŝordigon, kiam ni pli forlasas tiun ĉi favoreblan vidpunkton. Sed se ni rigardas la teron de ok diversaj vidpunktoj, kvar super kaj kvar sub la ekvatoro, poste kunigante tiujn ĉi ok egalprecizajn sekciojn en unu sola karto, ni havas platan, sed samtempe akuratan figurajon de la mondsurfaco.

Brewster F. Ames, advokato,
San Francisco, Kalifornio, USA.

Kulturo.

Nova turka alfabeto.

Prezidanto de l' komitato por enkonduko de nova turka alfabeto, Agamali-Ogli, entreprenos vojaĝon tra sovetaj respublikoj, en kiuj superas muslima loĝantaro. Celo de la vojaĝo estas kunvoko de tutsovetlanda konferenco pri demando de enkonduko de nova turka alfabeto en Azerbajĝana, Krimea, Dagestana, Baŝkira, Turkestana respublikoj kaj ankaŭ en kelkaj apudvolgaj regionoj.

La kunvokon de tutsovetlanda konferenco antaŭiros kongreso pri ĉi tiu temo de reprezentantoj de ĉiuj transkaŭkazaj respublikoj.

En la tatara gazetaro lasttempe tre vigliĝis la diskutado pri latinigo de la tatara alfabeto. *H. Frank*, Kazanj.

Filatelio.

Novaj poŝtmarkoj por bonfaraj celoj en Aŭstrio.

Por la afranko de poŝtsendaĵoj en- kaj eksterlandaj povas esti de la 6 sept. ĝis 31 dec. 1924 uzataj 5 novaj poŝtmarkoj: 100 K helverda, 300 K brunruĝa, 500 K brunviola, 600 verdblua, 1000 malhelorangkolora. Ili montras rilate al sia celo: 100 K — La arton kiel konsolantinon; 300 K — agrikulturon kaj metion; 500 K — La patrinamon; 600 K — La mildfaremecon; 1000 K — La naturon kiel donacanton. Ĉiu valoro valoras la kvaroblon, do la tuta serio 10 000 K aŭstraj.

Ĉiu markbildo enhavas la vorton „Post" (Poŝto) kaj la jarnombron 1924.

Supre troviĝas sur blanka strio per kolora skribo la nomo: „Oesterreich" (Aŭstrio). La malsupra rando montras ankaŭ per kolora skribo sur blanka fundo maldekstre la nominalvaloron, dekstre la plialtigon.

La surpresita teksto estas sur ĉiuj poŝtmarkoj 18 mm larĝa, 26 mm alta, la nesurpresita paperrando estas supre kaj ambaŭflanke $1^1/_2$ mm, malsupre 2 mm larĝa kaj $12^3/_4$ truumita.

Franz Bischof, verkisto, Wien.

Mistero pri viktimoj de Tut-Ank-Amon.

De Edgar Th. Havránek,
komitatano de la ĉeĥa metapsika societo en Praha.
El la ĉeĥa tradukis kun afabla permeso de la aŭtoro
Jenda Molnar.

Egipta „Valo de l' morto" apud Luksor estis dum la komencaj tagoj novembraj de la jaro 1922 scenejo de sensacioj, kiuj interrilatas kun malkovro de la kripto de faraono Tut-Ank-Amon*) de la XVIIIa dinastio (el epoko de l' j. 1550 antaŭ Kristo). Plejmulto da gazetoj skribas, ke „fantazio kaj superstiĉo ĉi tie havas liberan spacon". Mi ne volas tiun ĉi frazon nei; nek polemiki pri ĝi; kontraŭe, mi estas konvinkita pri ĝia ĝusteco pli ol iu alia. Mistero de Tut-Ank-Amonaj viktimoj, da kiuj estas jam granda, senĉese kreskanta vico, jam senpere timigadas la cerbojn de la eŭropa homaro kaj kondukas al plej strangaj „klarigoj" pri „venĝo de postmortaj spiritoj" kaj similaj aĵoj, kiuj klarigoj nur senbezone ridindigas ĉe nefakulaj klasoj seriozajn kaj gravajn, ekzakte sciencajn esploradojn parapsikajn aŭ metapsikajn. Fanatikaj fideluloj insistas nepre je „supernatureco" de ĉi tiuj misteroj, kvankam ili estas venkeblaj per la simpla fakto, ke io, kio efektive jam ekzistas, jam per si mem devas esti natura. Cetere ankoraŭ multe da aliaj „naturaj" aĵoj por scienco estas ankoraŭ misteroj: kiel elektro, magnetismo kaj aliaj fortoj. Ni eĉ ne konas ĝis nun ĉiujn fortojn naturajn, kiuj estas vere naturaj (normalaj). Asertado de kontraŭo estus absurdeco. Kial do okaze de Tut-Ank-Amon ne devus esti parolite pri nekonata, sed alie tamen tute normala forto natura?

Mi estis en la ĉeĥoslovaka respubliko la unua, kiu tuj post alveno de sciigoj pri la morto de Lordo Carnarvon publike paroladis pri la mistero de lia morto samtempe kun sciencaj klarigoj pri ties kaŭzoj. Tiu klarigo estis akceptita de faka forumo de ĉeĥa societo metapsika kiel la plej versimila kaj ĝi tute ne estas „supernatura".

Antaŭ ol mi koncize citos ĝin, ni rigardu la faktojn de Tut-Ank-Amonaj viktimoj komence de la kazo de Lordo Carnarvon ĝis la plej nova tempo.

Super eniro de Tut-Ank-Amon-a kripto estas konata epitafo hieroglifa: „Polviĝu la mano, kiu leviĝos kontraŭ mia bildo! Polviĝu tiu, kiu etendos manon kontraŭ mia nomo! Li gardu sin kontraŭ mia patro Amon**) — malfeliĉo rapide venos!" Do, ĝi estas malbeno, kiun kvazaŭ elparoladis buŝo de balzamita kadavro faraona. Kaj malfeliĉo fakte venis rapide — kaj ne restis nur unu: entrepreninto de la elfosoj, riĉa angla sportulo, Lordo Carnarvon, eniris unua en la kripton kaj mortis, pikite de insekto. Amiko de la Lordo, amerika miliardulo George Jay-Gould, scivoleme ankaŭ eniris tien kaj mortis, infektite de pesto. Kaj ankoraŭ tria multmilionulo Wolf Jiel pagis sian scivolemon per morto, kiam li reveturadis hejmen sur sia propra jaĥto. Howard Carter, direktanto de la elfosoj, grave malsaniĝis. Edzino de Carnarvon dum sia vojaĝo per flugveturilo en Egiptujon nur mireginde savis sin de la morto per „hazarda" katastrofo. Al lorda familio okazis krom tio aliaj malfeliĉaĵoj kaj akcidentoj. Sekretariino de Carnarvon ankaŭ grave malsaniĝis. Scienculo Archibald Douglas Reid, anglo, mortis sur vojo al Luksor, kie li intencis tralumi kadavron faraonan per Roentgen-radioj. En la lasta tempo mortis unu el arĥeologoj, invititaj al malfermo de Tut-Ank-Amona kripto, post mallonga malsano, sinjoro Lafleur, profesoro de la Toronta universitato en Kanado.

Ĉi tiu mistera interligiteco kun difektiĝo de milijara kvieto de mortinta egipta reganto forvagiĝas ne nur en bagatelaĵojn (ekzemple: Carnarvon havis enirante en kripton surŝulire malsovaĝan obeeman kanarion, kontraŭ kiu elsaltis subite el angulo granda vipero, kobro kaj englutis ĝin) sed terurmaniere disvastiĝis dum la malfermo de la sarkofago en tuta regiono de Luksor: per pesto . . .

Kion ĉiu opinius, estas: ĉi-ĉio estas hazardo, okazo! Mi respondus: Mi bedaŭras, ke mi ne havas sufiĉe da spaco por sufiĉe klarigi multfoje jam atestitan fakton, ke tute analogie influadis malbenoj, lokigitaj ankoraŭ en aliaj antikvaj tomboj post ties malfermo.

Do pri kio agiĝas ĉi tie? Ĉu vere pri venĝo de mortintoj? — Jes kaj ne. Tuj mi klarigos tion.

Ni reiru tien, kie ni diris, ke ni ne konas ĉiujn fortojn naturajn. Al ili apartenas unuavice la forto de l' homara penso. Jam Pasteur diris: Sed la antikvuloj konis misteran forton de tio, kio estas „malantaŭ ĉiuj aferoj". Kial do ili ne konus ankaŭ forton de l' penso, por ni hodiaŭ tiel misteran, en kiun ni nur nun komencadas enpenetri helpe de nia scienco tiel pene esploranta? Ni ne forgesu, ke ĉi tie agiĝas pri antikvaj egiptoj! Egiptujo estas klasika lando de ĉiuj eblaj psikaj praktikoj, pri kio atestas ĉiuj antikvaj libroj de Hermes. Pastroj egiptaj konis forton de homara penso kaj kredis je ĝi fortege kaj ne venkeble, kiu laŭ konataj vortoj de l' testamento „montojn transportas". Al ĉi tiu profunda kredo ili inciti is sian fantazion per diversaj misteraj simbolaj ceremonioj. Ili komprenis formigi pensojn kvazaŭ konkretajn, ili sciis ion, kion ni povus nomi ideoplastikon***). Sed tio ne sufiĉus. Por ke estu aldonita al „pensa formo" senlima vivpleneco aŭ populare dirite por ke estu kreita el ĝi preskaŭ vivanta estaĵo, al ĉi tio necesa estas speciala forto. Ĉi tion ni nomas moderne galvanizi pensojn.

Do, egipta malbeno, enmetita per fiksaj (precizaj) ceremonioj kaj psikaj funkcioj en kripton de Tut-Ank-Amon, estis kvazaŭ galvanizita ideoplastiko, kiun oni povas populare kompari al revolvero kun restreĉita ĉano, ĉiam preta al falfermiĝo kaj tial al pafo. Tuj, kiam estis transpaŝita la malpermeso de malbeno, ĉano malfermiĝas — galvanizita ideoplastiko aplikas kiel jam pli frue difinitaj venĝantaj efikoj tion, kio estas plej proksime, kio ajn ĝi estu: forŝirita roka ŝtonego, venena insekto, venta trombo, pesta bacilo ktp.

Tiel nomata „oficiala scienco" eble ridindigos tion. Ĝi estu ridanta. Ĉu ĝi scias, ke estas pli da aĵoj, pri kiuj ĝi scias, ke ĝi ilin ne konas, ol aĵoj, pri kiuj ĝi ne scias, ke ĝi konas ilin?

Mi finas per vortoj de Shakespeare: „Estas multe da aĵoj inter la ĉielo kaj tero, kiujn ne atingas via teoria scio, Horatio!"

*) La nomo Tut-Ank-Amon signifas „Bildo vera de Amon".

**) Amon estis la plej supera dio de egiptoj.

***) Mi atentigas al ilustrita eldonaĵo de membro de ĉsl. societo metapsika, amiko D-o O. Eliáš: Ĉu la mortintoj vengas sin? Je limo de aperigo de Tut-Ank-Amona kripto kaj tragika morto de ties eltrovinto „Lord Carnarvon". Biblioteko „La Paiko" volumo V., kie estas menciitaj tutaj vico de ekzemploj kaj krome rimarkite, ke al kateno de ĉi tiuj okazintaĵoj apartenas ankaŭ jam konata katastrofo de grandega vaporŝipo „Titanic".

Ke ekzistas io simila fakte, tion atestas modernaj eksperimentoj kaj esplorajoj de D-o Naum-Kotik en Leningrad, kolonelo de Rechas en Paris k. a.

Diversaĵoj.

Kie estiĝas la germanaj libroj? (1922.)

	Eldonistoj	Libroj
Berlin	665	4 483
Leipzig	333	3 920
München	177	1 638
Stuttgart	115	1 722
Dresden	107	628
Hamburg	107	580
Frankfurt a. M.	55	310
Breslau	43	246
Hannover	40	238
Köln a. Rh.	32	182
Halle a. S.	30	234
Freiburg i. Br.	28	415
Darmstadt	26	76
Düsseldorf	26	21
Weimar	23	61
Nürnberg	20	71
Essen	18	54
Wiesbaden	17	124
Karlsruhe	17	111
Würzburg	17	49
Bonn	16	122
Kassel	16	95
Braunschweig	15	181
Münster i. W.	15	124
Magdeburg	15	50
Augsburg	15	34

Laŭ „Buchhändler-Börsenblatt".
Heino Heitmüller, Bremen.

Kion vi povas memori?

Iu hinda studanto estas homa kalkulanta maŝino. Li faras la plej malsimplajn sumoin sen la uzado de plumo kaj papero, kaj povas tuj doni la tagnomon de iu dato de la estinteco aŭ estonteco.

Kiel provon, oni kretskribis sur la nigra tabulo du numerojn, ĉiu je kvardek ciferoj. Post malpli ol duona horo mense kalkulante, li donis la korektan solvon.

Granda greka klerulo konis parkere ĉiun linion de siaj favorataj klasikuloj. Li tamen diris, ke lia memoro estis malbeno, ĉar ĝi devigis lin memori tion, kion li prefere volis forgesi.

Alia viro povis ripeti laŭvorte iun predikon, kiun li estis aŭdinta. Unu de liaj rimarkindaj faroj estis, tramarŝi tra okupata strato de London kaj, ĉe fino, ripeti ĉiun signon kiun sin elmontris en la trairejo.

Italo kiu havis mirindan memoron povis evitigi de amiko jarlongan laboron. La amiko alvenis al li, pliplorante la perdon de manuskripto, kiu estis bezoniginta jaron por la skribado. La italo sidiĝis kaj reskribis la tutan manuskripton laŭmemore, kvankam la amiko al li nur unufoje ĝin montris.

Negra vesteja servisto ĉe amerika hotelo havis rimarkindan memoron je vizaĝoj. Dum grandaj kunvenoj li zorgis pri la apartenaĵoj de gastoj kaj poste redonis ilin al la propraj posedantoj sen la helpo de markoj aŭ biletoj. Li fidis sole al sia memoro kaj neniam eraris

Leslie E. Thomas,
3 Albert Terrace, Rogerstone,
Mon., Anglujo.

La Deksepa definitive en Genève.

La 28 septembro okazis en Biel la jarkunveno de la Svisa Esperanto Societo. Raporto aperos en proksima numero de ET.

Plej grava decido estas invito de la Deksepa al Genève. La anoj de l' C. K. unuanime akceptis la proponon.

Oni do jam nun preparu sin por vizito de l' Deksepa en Genève.

La preparoj por la kongreso kredeble estos baldaŭ komencataj.

La Internacio de P. T. T. akceptas Esperanton.

De l' 14—17 septembro okazis en Wien la kongreso de la Internacio de Poŝt-, Telegraf- kaj Telefon-oficistoj (I P. T. T.) Bedaŭrinde ni nur nun ricevis kelkajn informojn pri la kongreso, sed ne detalan raporton, kies detaloj sendube ebligus al ni informi nian legentaron laŭnecese. Ĝojiga fakto estas, ke tiu kongreso, reprezentanta pli ol 50 000 geoficistojn de P. T. T., akceptis rezoluciojn por Esperanto kiel lingvo de I. P T. T. kaj rekomendis al la filiaj unuiĝoj akceli la starigon de Esperanto-kursoj por geoficistoj de la poŝta sfero.

Ankaŭ la idistoj sendis proponon por Ido kaj delegitaron, sed ne sukcesis.

Oni devas gratuli la perintojn de rezolucio por Esperanto pro ilia valora laboro, kiu ne estos sen sekvo en la diversaj landoj.

La Svisa Poŝt- kaj Telegrafadministracio akceptas Esperanton.

La prezidanto de ILEPTO s-o D-o Spielmann informis nin, ke la Svisa Poŝt- kaj Telegrafadministracio laŭ decido de 28 junio deklaris sin preta pagi la kostojn por Esperanto-kursoj aranĝataj por poŝtaj geoficistoj. La administracio nun plie deklaris sin preta afiŝi specialan atentigon al ĉiuj giĉetoj, kie deĵoras poŝtoficistoj parolantaj Esperanton.

Plia gratulinda sukceso, kiu montras la fruktojn de disciplinita fakorganizo. Estas dezirinde, ke aliaj samideanoj lernu el tiu ekzemplo.

„Berliner Tageblatt" propagandas Esperanton.

Ni jam raportis en nia gazeto pri la enkonduko de Esperanto en la grandan anoncagentejon kaj gazeteldoneion de Mosse.

La plej grava ĵurnalo de tiu entrepreno „Berliner Tageblatt" la 20. 9. komencis aperigi kurson de Esperanto, kiu daŭrados en ĉiu sabata numero de tiu gazeto. Tiun sukceson ni ŝuldas al malnova kaj fervora samideano s-o D-o Kliemke, konata per siaj verkoj sub pseŭdonimo Heinrich Nienkamp.

La nomita gazeto apartenas al la plej disvastigitaj gazetoj en Germanujo. Oni do povas taksi, ke la utilo de tiu ĉi kurso estas grandega.

Estas pro tio honora devo de ĉiu germana kaj de eksterlandaj samideanoj subteni la entreprenon Mosse. Ĝi ankaŭ aperigis la konatan praktikan „Kodo de Mosse".

Radio.

Radio-disaŭdigo en Hamburg.

Ni jam informis, ke komencante la 15. 10. s-o Karl Minor, L. K. ĉiutage dum dek minutoj disaŭdigos novaĵojn en Esperanto de la stacio de Hamburg. Aŭskultintoj skribu tuj al la stacio. Propagandistoj multenombraj siaparte sendu nepre gratul-leteron al la stacio por pruvi, ke Esperanto estas disvastigita en tuta mondo. Speciale impresaj estos kartoj de transmaraj, ekstereŭropaj landoj kaj de samideanoj en malgrandaj ŝtatoj.

Notu la adreson: „Norag", Artushof, Gr. Bleichen, Hamburg.

Du pluaj germanaj radiogazetoj por Esperanto.

La plej granda kaj tre disvastigita berlina radiogazeto „Der Deutsche Rundfunk" (Germana Rondradio), Eldonejo Rothgiesser & Diesing A.G., Berlin S. 42, Prinzenstraße 98, kiu jam kelkfoje enhavis artikolojn pri Esperanto, nun komencis aperigi Esperanto-kurson por sia legantaro, redaktitan de s-o telegrafinspektoro Behrendt. Jam en ET 208 ni raportis pri la bonega rezultato de enketo, montrante, ke 30% de la respondintoj deziras instruadon de Esperanto.

Alia berlina radio-gazeto „Radiowelt" (Radiomondo) Eldonejo H Kegel, Berlin-Schöneberg, Eberstraße 59, nun ekkomencos aperigon de Esperanto-kurso por siaj legantoj ankaŭ redaktata de s-o Behrendt.

Amerika dolarfundo por la helplingvo.

Oni sendis al ni el diversaj partoj de Eŭropo gazeteltranĉaĵon de noto, ke sub gvidado de s-ino Dave Hennen Morris (filino de la konata amerika riĉegulo Vanderbild) oni starigis en Usono dolarfundon por la akcelado de la helplingva ideo. En kelkaj gazetoj oni parolis pri 100 000 dolaroj, en aliaj eĉ pri $2^1/_2$ milionoj.

Ni skribis al unu el la komitatanoj de la novefondita „International Auxiliary Language Association in the United States (Inc.)" (Asocio por Internacia Helplingvo en Usono, registr.) en Washington kaj ricevis la informon, ke la fundo estas fondita sed ke la mono kompreneble devas ankoraŭ esti kolektata.

Al kelkaj notoj estis aldonita rimarko de idistoj, ke la decido de kuratoroj de tiu ĉi fundo nur povas esti favora por Ido.

Malkonsoligas nin la fakto, ke la kapitalo ne jam estas disponebla, aliflanke ni ne dubas, ke nia espero pri la favorigo al Esperanto povas esti tre granda. Se la nomita asocio, kiu decidos pri la uzo de l' kolektota mono kaj kies membro estas s-ino Morris, faros saman esploron kiel la konata American Radio Relay League, la finrezultato jam nun estas klara. *R. Kr.*

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Eŭropo.

Ĉeĥoslovakio.

Hranice, Moravio. Ĵaŭde, la 2 oktobro, vespere, okazis la festa malfermo de II. kurso de Esperanto en Hranice. Ĉeestis sinjoroj: D-o Janiš, estro de politika administrado, D-o Mohelnický, landestrara sekretario, V. Jonáš, urbestro Č. Kramoliš, regiona inspektoro de lernejoj, A. Hluzin por metiistaro, Prof. Kudrna kaj multaj aliaj. Enskribitaj kursanoj estis 50.

Estro de Esperantista Klubo en Hranice sinjoro Hanuš malfermis la kurson. Poste parolis sekretario de klubo s-o Bryndač. La kurso okazos ĉiumarde kaj -vendrede.

Oni petas tutmondan samideanaron helpi al la grupo per sendo de diversaj esperantaĵoj.

Adreso: Rud. Charbulák, deleg. UEA, Hranice, Ĉeĥoslovakio.

Germanujo.

La 14 septembro okazis en Emmerich propaganda parolado de s-o Schumacher, instruisto en Cleve kaj samtempe kunveno, kiun partoprenis grupanoj el Cleve, Recklinghausen, Düsseldorf, Nymegen (Holando) kaj s-o Agourtine el Paris. La kurso estas gvidata de s-o Duffeis. Dank' al li la loka gazeto „Bote vom Niederrhein" presigis favoran raporton kaj ekspozis en sia montro-fenestro esp. afiŝon.

Selb (Bavarujo). Okazis lumbildparolado per Esperanto de s-ano Pech el Pilsen (Ĉeĥoslovakio). Uzinte sian libertempon, por travojaĝi diversajn landojn de Eŭropo, li faris tiuokaze multajn lumbild fotografaĵojn.

Ĉeestis pli ol 500 personoj. (Selb nur estas urbeto kun 1400 enloĝantoj).

En la unua parto de la parolado estis montrataj kaj pritraktataj vidindaĵoj kaj naturbelaĵoj de Ĉeĥoslovakio. La dua parto montris vojaĝbildojn de Germanujo, Belgujo, Anglujo kaj Francujo. Bildoj de la ekspozicio en Wembley precipe atentigis la vizitintaron.

La parolado estis tradukata germane, por ke la partoprenintoj havu bonan okazon konvinki sin pri la uzebleco de nia lingvo, kaj la aklamo montris grandan simpation por nia ideala celo kaj pruvis sukcesplenan aranĝon.

Jarkunveno de Revelo.

La 4—5 oktobro okazis en Köln la jarkunveno de Rejnlanda-Vestfalia Esperanto Ligo (Revelo), samtempe kun la 18-a fondiĝa festo de Neŭtrala Esperantistaro Köln.

Sabate estis vesperfesto en salono de Parkdomo (Rejnparko) kun bona koncerta programo kaj balo.

Dimanĉon antaŭtagmeze okazis matenkunveno en la grupkunvenejo, kunsidoj de ekzamen-komisarioj de Esp.-instituto por la Germ. Respubliko, kaj de UEA.

Posttagmeze kunvenis la delegitoj de 14 grupoj en hotelo Obladen por pritrakti en laborkunsido la aferojn de la ligo. La prezidanto de Revelo s-o Junker raportis pri la stato de la ligo. Revelo havas nun 27 grupojn kun ĉ. 400 membroj kaj estas la plej vigla ligo de GEA. La kasisto donis resumon pri la stato de la kaso, kiu havas malgrandan enkason, kvankam la kotizoj alvenis nesufiĉe kaj neregule. Post malŝarĝigo de la estraro oni reelektis la grupon Köln kiel estraran grupon. Poste oni diskutis pri la kongreso de GEA okazinta en Plauen, pri la oficiala lingvo dum la germana kongreso (la plimulto opinias, ke en Germanujo oni devas nepre intertrakti en germana lingvo, almenaŭ dum la venontaj jaroj), kaj pri la oficiala organo de GEA.

Koncerne esp. kartelojn oni aŭskultis diversajn praktikajn informojn. S-o instruisto Dahmen el Horrem faris koncizan paroladon pri la neceso de lecionaro por kursgvidantoj. S-o Kreuz informis pri la uzado de Esperanto ĉe radiotelefonio kaj pri Ido. Koncerne la lokon de la printempa kunveno de Revelo oni akceptis la inviton de la grupo Krefeld.

Fine oni diskutis la aranĝon de Internacia Esperanto-Semajno apud la Rejno, okazonta antaŭ la 17-a Universala Kongreso. Oni volas baldaŭ komenci la preparojn en kontakto kun la aŭtoritataj esp. organizaĵoj.

Rumanujo.

Braŝov (Transilvanio). Kurso por laboristoj okazas en la sindikatejo. Partoprenas 19 personoj. Gvidas samideano Jakab.

Cernauti (Bukovino). S-o Kamillo Landmann la 18. 9. 24 malfermis kurson por junuloj.

Cetatea-Alba (Besarabio). S-o G. Kiŝinevskij organizis grupeton de 6 lernantoj.

Galatz. La propagando de s-o G. Kiŝinevskij resultigis grupeton de 5 lernantoj kaj kurson.

Rusujo.

Serpuhov (Moskvo), 2. septembro ekfunkciis kursoj de Esperanto permesitaj de loka instruestraro. 5 grupoj estas vizitataj de 90 personoj. Gvidantoj estas: N. Muhatajev, A. Pafomov kaj J. Arhipov.

Tambov, 17. 9. 24 en ĉeesto de tricent fervojaj gelaboristoj s-ino Anatolio Volo .ov faris prelegon pri Esperanto kaj Proletariaro. En preparata sub gvidado de A. Volohov esp. kurso enskribiĝis 40 gelaboristoj.

Esperanto en Lernejo.

La intereso de komercaj institutoj por Esperanto pligrandiĝas. Ĵus oni informis nin pri du novaj sukcesoj en Berlin.

La konata komerca privatlernejo „Flatauers kaufmännische Privatschule, Berlin C. 25, Dircksenstraße 56/57 aligis al si specialan fakon sub nomo: Lernejo de la Esperanto-kartelo de Berlin. Kursoj okazas ĉiumerkrede de 7—9 h.

Laŭ sama modelo la komerca privatlernejo de A. Foitzik, Berlin-Cöpenik, enkondukis Esperanton en sian lecionaron. Aparta kurso komenciĝos la 8. 10. kaj daŭrados ĉiun merkredon.

* * *

Bedaŭrinde ni tre ofte ricevas nur malfrue detalojn pri decidoj por Esperanto. Eĉ en kelkaj gravaj kazoj oni ne sendas al ni iun informon.

Pro tio ni povas nur hodiaŭ sciigi pri la du sekvantaj sukcesoj:

En Herne en Vestfalio (Germanujo) la 13 julio okazis konferenco de instruistoj en nereligiaj lernejoj. Laŭ propono de s-o Schröter-Herne oni kontraŭ 1 voĉo de idisto akceptis rezolucion por Esperanto, rekomendante la lernadon al ĉiuj instruistoj kaj instruistinoj kaj petante la ministerion por arto kaj popolklerigado de la germana respubliko permesi la enkondukon de Esperanto en tiuj popollernejoj, kie ekzistas instruistoj de Esperanto.

Dum la Kultursemajno de la socialdemokrataj instruistoj germanaj en Leipzig oni akceptis rezolucion por Esperanto kun la peto enkonduki Esperanton kiel fakultativan fakon en la planon de la popollernejoj

Ĉi-tiuokaze ni petas nian legantaron ĝustatempe informi nin pri tiaj gravaj okazantaĵoj, kiuj ne nur estas gravaj por disvastigo en tuta mondo, sed ankaŭ notindaj por la statistiko.

Por aktualigi ET
ni bezonas mallongajn tradukojn aŭ originalojn praktikajn el plej diversaj sferoj. Interesatoj
bonvolu subteni nin aktive.

La Deksesa.

Finfino.

„Kaj nun mi finas."

Ĉu efektive?

Estas al mi, kvazaŭ en angulo de mia ĉambro iu sidus kaj malice ridaĉus.

Mi rigardas en la direkton, el kiu ŝajnas veni la malica ridaĉo: estas malbela diableto kun flugiloj de vesperto.

„Hahaha!" li ridaĉas rikane. „Ĉu vi finis? Hahaha!"

Mi ekkoleras, prenas balailon kaj svingas ĝin kontraŭ la maliculo. Sed li estas lerta kaj scias eviti la baton. Jam li sidas en alia angulo kaj rekomencas ridaĉadon.

„Hahaha! Ĉu vi finis? Ĉu efektive vi finis? Hahaha!"

Mi malfermas la fenestron kaj denove ekprenas la balailon. Sed la diableto preferas alian elirejon. Fulmrapide li sidas ĉe la forno, malaperas tra fendeto en ĝian internon kaj forlasas la ĉambron tra la kameno.

Sed mi estas malfrankviligita. Mi havas la senton, kvazaŭ io ne estus en ordo.

Kaj fakte — ĵus la ET-numero kun la fino de mia raporto estas presita, kiam oni alportas al mi aldonan folion de n-o 208 kun tiu parto de mia raporto, kiun mi kredis perdiĝinta. Fulmotondro! Kian malicaĵon permesis al si la preserara diableto kun mi!

La klarigo estas simpla. Mi ricevis en Venezia la ĝis tiam aperintajn ET-numerojn kun mia raporto, sed en la ricevita ekzemplero de n-o 208 mankis la aldona folio, kiu enhavis la parton de mia raporto temantan pri Zagreb. Pro tio mi kredis tiun parton perdiĝinta kaj uzis miajn tiurilatajn notojn duan fojon en n-o 212.

Kio okazis, ne plu estas farebla neokazinta. Cetere, ni farus tro grandan honoron al la malica preserara diableto, se ni multe ĉagreniĝus pri ĝi.

Do, finfinite! *T. J.*

Bibliografio.

Festgazeto por la V-a Asocia Tago de Laborista Esp. Asocio Germanlingva, Pasko 1924. (45 pĝ.)

Tiu ĉi gazeto simile kiel multaj aliaj aperintaĵoj de la lasta tempo pruvas la seriozan enradikiĝon de Esperanto en la laborista movado. Oni devas gratuli la kongreskomitaton pro tiu bonega aranĝo. Ankaŭ la enhavo estas tre elektita kaj enhavas inter aliaj rimarkindan artikolon de Prof. Dietterle pri: „Ĉu oni pensas en lingvo?"

Jef Denyn's belaardspeel, Mechelen 1924. 48 pĝ. 12,5×21 cm, broŝ.

Denove prezentiĝas antaŭ ni informilo 5-lingva pri la famaj sonorilaroj de Mechelen-Malines kun Esperanto-parto. Ĉiu interesato devus aĉeti tiun ĉi gvidilon por pruvi al la aranĝantoj de la sonorilar-koncertoj la utilecon de Esperanto.

Saltego trans jarmiloj. Romano originale verkita de Jean Forge. Eldonejo Hirt & Sohn, Leipzig. 1924. 192 pĝ. 13½:19½ cm. Bindita. 4,50 ormk.

Per fortoj disvolviĝintaj Forge (pseŭdonimo de juna pola verkisto) konstruis sian duan esperantlingvan romanon. Ne senbride li estris la fantaziemon, kiu donas al la verko karakterizan signon. Antikva kaj moderna epokoj en sprita maniero kaj harmonio kunfandiĝas; kalejdoskopo turniĝas kaj ĵetas multkolorajn bildojn sur la muron de scenejo. Promenas fraŭlino Snob kun Marcus Vinitius, forrifuĝas konsternite Nerono, kiam la gramofono eksonas. La temo elverŝis abundan amason da pensoj, momentoj, komparoj — neelĉerpebla fonto de l' fantazio. — Logiko, bonkompreneblecо kaj klareco, ĉion misteran malhavanta, distinges la modernmotivan rakonton de similaj, sed malbonaj naciaj romanoj nietempaj. — La leganto juĝu mem kaj ne heziru havigi al si la originalan verkon de nia talentita samideano; ĝi estas ornamo de ĉiu libraro. — Lingvo kaj stilo estas tre bonaj; preso kaj bindo montras zorgemon kaj akuratecon. — Malĝustaĵo estas orkano anstataŭ uragano (ŝajne skriberaro, ĉar kelkfoje mi trovis uragano); al bakhanalio la vortformo bakanalo estas preferinda; konfuziga preseraro (p. 10) estas ekbruliĝas anstataŭ ekruliĝas. *G. Ajul.*

La eldonejo P. Hitrov, Berlin-Charlottenburg 2 aperigas „Bibliotekon de Esperantio". Estas kolekto de libretoj po 20—40 paĝoj, formato 12×16 cm, kiuj enhavas originalajn aŭ tradukitajn verkojn de konataj aŭtoroj.

Nr. 2 V. Garŝin: Signalo, rakonto, traduko el rusa lingvo. Ni konatiĝas per tiu ĉi rakonto al la fama verkisto, la priparolanto de la teruraj sekvoj de l' milito, la sentema animo de tiu ĉi tragedia homo.

Nr. 4 L. Tolstoj: Dio unu por ĉiuj, rakonto, traduko el la rusa lingvo.

Nr. 6 Anton Ĉehov: Rakontoj, el rusa lingvo tradukis P. Hitrov. A. Ĉehov estas unu el la plej simpatiaj rusaj verkistoj, la posedanto de „la premio de Puŝkin", la sukcesplena novelisto kaj drama aŭtoro. Liaj rakontoj montras — kiel L. Tolstoj diris de li — ke „li prenis el la vivo tion, kion li vidis, sendepende de ĝia enhavo, kaj li redonis ĝin mirinde bilde kaj kompreneble, detale klare."

Pro tio la malgrandaj libretoj interesas ĉiun esperantiston, kiu volas konatiĝi kun la propreco de la rusa popolo kaj ĝiaj verkistoj.

Laŭ presaranĝa vidpunkto la kajeretoj tamen havas sufiĉajn mankojn. Ankaŭ rilate al la lingva enhavo multo estas plibonigindа. Ili ofte enhavas strangajn vortformojn kaj neologismojn. *H. Dahmen,* Horrem.

Esperanto-gazetoj.

Arguso, Mexico D. F., julio, aŭgusto.

Fluganta Skribilo, Issy (Seine), septembro.

Luzacia Observanto, Zittau, aŭgusto.

Germana Esperantisto, Berlin, aŭgusto, septembro.

Der Arbeiter Esperantist, Leipzig-Th., aŭgusto, septembro.

Itala Esperanto Revuo, San Vito al Tagliamento, majo, junio, julio.

Marto, Haida, julio.

Brazila Esperantisto, Rio de Janeiro, januaro, aprilo.

Katolika Mondo, Graz, marto, aprilo, majo, junio.

L' Antinationaliste, Paris, marto, aprilo, majo, junio, julio.

La Policisto, Budapest, majo, junio, julio.

La Unuigita Tuthomaro, Hamburg, majo, junio.

Paustians Lustige Sprachzeitschrift „La Gajulo" in der Welthilfssprache Esperanto.

(Amuza lingvo-gazeto de Paustian „La Gajulo" en mondhelpa lingvo Esperanto) n-o 1, 1-a jarkolekto. 12 pĝ. Red.: Karl Minor, L. K. Eldonejo: Gebrüder Paustian, Hamburg 1, Alsterdamm 7. Jare (5 numeroj) ormk. 1.20.

Nova ekzerca gazeto en Esperanto. Konataj estas la franca, angla kaj hispana eldono de la sama eldonejo. La enhavo estas bona kaj respegulas entute la karakteron de nia ege kritikema L. K.-ano Minor. Sendube ĝi taŭgas bonege por pligrandigi la aron da seriozaj kaj perfektaj esperantistoj. Ni tamen dubas pri la nepra neceseco de tiu nova gazeto, post kiam „Esperanta Praktiko", iame redaktita de K. Minor, devis kunfandiĝi kun „GE" verŝajne por povi vivi. Krome, se la gazeto estu utila, ĝi devus aperi ne nur 5-foje dum la jaro.

Svenska Arbetar-Esperantisten, Göteborg, aŭgusto.

Pola Esperantisto, Warszawa, aŭgusto.

Ĉiu interesato
pri la japana movado
kaj
antaŭ ĉio
ĉiu
Orientano
devas
subteni la japanajn samideanojn kaj
nepre aboni al
La Revuo Orienta
Monata organo de la japana esperantistaro.
Jarabono 7 sv. fk.
Adreso:
Japana Esperanto Instituto,
Tokio, Uŝigome, Ŝin Ogaŭamaĉi III/14.

‚Esperantista Junularo'
Organo de UEA-Junularo — bela por infana literaturo — internacia lernejo-servo. Abonprezo po numero ½ afranko de letero por eksterlando (jare 8 n-oj).
Administracio: A. Neupert,
Wedellstr. 17 - Leipzig-Möckern, Germ.

Abonu al
Internacia Medicina Revuo
Oficiala Organo de T. E. K. A.
Ĉefredaktoro: D-o Karl Mezei.
VI. Teréz körut 6, Budapest, Hungarujo.
— Petu specimenon! —

La plej malmultekosta libro en Esperanto
Ĉiu devas nepre posedi la libron
Eŭropo ĉe la abismo
de
Francesco Nitti
iama ministrara prezidanto itala
Esperanto-traduko
kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.
(Preskaŭ 200 paĝoj.)
Prezo 4 sv. fk.
Mendu tuj!
La livero al privatpersonoj okazos nur post antaŭa pago de la sumo de 4 sv. fk. plus sendkostoj de 25 centimoj po ekzemplero, pagebla en la valuto de la koncerna lando, transkalkulita je la kurso de la borso de Zürich (Revendistoj turnu sin pro specialaj kondiĉoj al la eldonejo)
Skribajn mendojn adresu al:
Frankfurter Societäts-Druckerei G. m. b. H.
Abtlg. Buchverlag - Frankfurt a. M.
Korespondo en Esperanto. :—: Ilustritaj kartoj rifuzataj.

Anoncetoj.

EDZIĜO. F-lino Hilda Emmer en Caransebes (Rumanujo, Banato), la 28. 9. 24 edziniĝis kun s-o subleŭtenanto Ioan Radulian. (Ni gratulas, Red.) [1

KIU VOLAS HELPI MIAN PREĜEJON, kiu estas restarigota, sed neniom havas da mono, mi apelacias al la bona koro esperantista. Adreso: Pastro L. Sonnenfeld, Wenigzell, Stirio (Aŭstrio). [1

KOOPERATIVULOJ ATENTU! La Torquay Esp. Grupo okazigos kooperativan letervesperon je la 26 novembro. Ĉiu kooperativa grupo eksterangluja' aŭ grupo kunvenanta sub la aŭspicioj de la koop. movado estas petegata sendi leteron aŭ p.k. menciante la nombron da membroj, kiujn ĝi enhavas. Al ĉiu respondanto estos sendata p. k. de bela Torquay. Adresu: S-o W. R. Wood, 2, Upton Vale Terrace, Torquay. [2

LA SVEDA SAMIDEANO, kiu sendis al mi revuojn „Allt för Alla" kaj „Värt Hem" estas petata bonvole skribi al mi sian adreson, por ke mi povu al li resendi laŭ liaj deziroj. L. A. De Greef, 28 rue des Hayettes, Lodelinsart (Belgujo). [1

KURSGVIDANTOJ! Por diversprofesiaj gekursanoj mi serĉas gekorespondantojn. Bela Spitzer, del. de UEA., Subotica, Jugoslavio. [1

GRANDEGA PETO. Kiu rusa samideano scias ion pri la sorto de mia edzo Henry Meining, militkaptita 24. 12. 1914 apud Inovlodz (Polujo). Treege mi petas sciantojn al s-ino Klara Meining, Chemnitz, Freigutstr. 22, Saksujo (Germanujo). [1

LA ESPERANTA GRUPO „MOJSIJE PAIC" EN ZEMUN (Jugoslavio) vendas „La trezoro de l' orajisto" de August Senoa, historia romano el XVI. jarcento. El kroata lingvo tradukis Fran Kolar-Krom. — La libro estas 290-paĝa, kun portreto de la aŭtoro, broŝurita, formato 15×20. papero bonega, eldonita en la jaro 1911, rekomendita de Kabe. Ĝi estas unu el la pleibonaj kroataj romanoj. La prezo estas nur 45 dinardj aŭ 5 sv. fk. Adreso por mendoj estas la grupo mem. [1

LETERVESPERO. La Esperanta grupo „Amikaro" en Langenaŭ apud B.-Leipa, Ĉeĥoslovakio, aranĝos la 6 oktobro propagand- kaj letervesperon. Gesamideanoj el la tuta mondo estas kore petatai, sendi il. PK kun bfl. afr. Laŭ deziro niaj korespondemuloj danke rekompencos sammaniere al ĉiu sendinto. [1

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Paŭlo Avdevnin, Saratov, poŝte restante, Rusujo, deziras korespondadi kun tutmondaj samideanoj. Interŝanĝas ankaŭ PM. Ĉiam respondos. [1

F-lino Mary Hendriks, 20-jara, Kanaalweg 50, Utrecht, Nederlando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj kaj precipe interŝanĝi PM kaj vidkartojn. [1

Per bela il. PK mi ĉiam respondas al ĉiuj, kiuj sendas al mi il. PK filatelie afrankita. „Pacamo", 5 rue de la Savonnerie, Perpignan, Francujo. [1

S-o Jordan Stojčev, fraŭlo, ul. Makedonska 102, Varna, Bulgarujo, deziras korespondi per L kaj il. PK. Interŝanĝas esperantajn librojn, il. gazetojn kun ĉiulandojn. Certa respondo. [1

H. Van der Mast, Lange Van Ruusbroeckstr. 56, Antwerpen (Belgujo) deziras interŝanĝi nedifektitajn PM kun ĉiuj landoj (krom Germanujo, Aŭstrio, Polujo, Hungarujo). Ne bagatelaĵojn. Interŝanĝas ankaŭ grandkvante. [1

M. Schepens, Jan Davidlei 45/5, Antwerpen-Kiel (Belgujo) deziras interŝanĝi PM kun ĉiuj landoj. [1

S-o Mikolaj Wiremiecko, pocz. Snow, pow. Niéswieski, folw. Tarejki, Polujo. Interŝanĝas il. PK kun interesaj vidindaĵoj kun amikoj ĉiulandaj. Mi certe respondas ĉiun skribaĵon. [1

S-o inĝ. Otto Schwarz, Teplitzerstr. 26, Aussig a. Elbe, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi PM kaj korespondadi per il. PK (nur vidaĵoj) kaj pri teknikaj temoj. Certe respondos. [1

La 25 novaj esperantistoj deziras eksterlandajn korespondantojn. Adreso: s-ano Leon Ringler, „Premier", Boryslaw, Polujo. [1

S-o Jozefo Siegmann, „Premier", Boryslaw, Polujo, deziras interŝanĝi PM (minimumo po unu serio) kun orientanoj, afrikanoj, afrikaj insulanoj kaj kun amerikanoj. Interŝanĝe mi sendas eŭropajn. [1

Kolportisto deziras korespondi je fakaj temoj. Adreso: Joano Harasym, Lwów, strato de Bilinskich 58, Polujo. [1

S-o Léon Agourtine el Paris dankas pro la afabla akcepto dum lia ĉeesto en Rejn- kaj Ruhrlando, la grupojn kaj samideanojn el Benrath, Bochum, Cleve, Crefeld, Düsseldorf, Elberfeld, Emmerich, Essen, Gelsenkirchen, Hagen, Horrem, Köln kaj Wiesbaden kaj petas pardonon, ke ne estas eble ciri la nomojn de ĉiuj esperantistoj helpintaj al li. [1

Rusujo. Natalio Vitaŝova, (22-jara fraŭlino), Serdobsk, Saratova Gubernio, Balabolina Str. n-o 6, deziras korespondi pri instruado, moroj kaj vivkutimoj. [2

La Hungara Esperantista Societo Laborista ŝanĝis sian sidlokon. Nova adreso estas: Budapest IX. Márton-u. 28. Samloke ĉiutage de la unua posttagmeze ĝis la 9-a vespere tie estanta oficisto volonte disponigas sin al travojaĝantaj esperantistoj. [1

18-jara hungara fraŭlino deziras korespondi kun la tuta mondo angle, esperante, pri ĉiuj temoj. Preferataj Ameriko, Italujo, Japanujo, Egiptujo. Adreso: F-lino Ida Farnos en Aiud, Rumanujo, Transilvanio. [2

F-lino deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj per il. PK kaj L. Ĉiam respondos. Adreso: J. Andersons, Kathakalna pagasta, Titurgas, caur Rigu, Latvio. [2

S-o A. Emödi, Stefánia-ut. 16, Budapest, Hungarujo, deziras interŝanĝi PM kun ĉiuj landoj. Sendas il. PK kaj PM. Nepre respondas. [2

S-o Melchior Dora (Lajos), bei Scar, Alzettestr. 49, Esch s-Alzette, Luksemburgo, deziras interŝanĝi il. PK (bfl.) PM 50—100, papermonojn ktp. [2

F-lino Jeorges Teixeira, Pinhal Novo, Portugalujo, esperanta lernantino, petas al tuta esperantistaro instigi ŝin per poŝtkartoj ilustritaj, esperantaĵoj ktp. [2

S-o Jorge Teixeira, juna verkisto, Pinhal Novo, Portugalujo, deziras korespondi kun tutmondaj literaturamantoj, prefere fraŭlinoj. Ĉiam respondos, esperante, latine aŭ france. [2

Kolektantoj de il. PK! Dezirante pligrandigi mian kolekton mi sendos belegan karton de Germanujo al ĉiu, de kiu mi ricevos karton (bfl.) legeble skribitan. Karl Hachmann, Cleve, Rheinland, Germ., Mittelweg 40. [2

N. Muhatajev el Serpuhov (Moskva) salutas la gesamideanojn tutmondajn: Eska, Elski, Bombo, Fajfanto, Ende, Ago, Kopytowska, Vojcehoviĉ; Richez (belgo), Molina kaj Iznardo (hispanoj), Kenig kaj ĉiujn aliajn gekorespondantojn. [2

Grupo de gekursanoj volonte interŝanĝus PK il., fotografaĵojn, leterojn kun gefraŭloj de tuta mondo. Ruslando, Serpuhov (Moskva gub.) al gvidanto de esp. kursoj N. Muhatajev por gelernantoj. [2

Laŭlege deviga teksto germanlingva: Verlag und Druck (Eldonejo kaj Presejo): T. & H. Jung, Horrem bei Köln. Verantwortliche Schriftleiter (Respondecaj Redaktoroj): Teo Jung kaj Rob. Kreuz, Horrem b. Köln.